

Eduard Ebel,

Milde falas la neg'

tradukita de N. N. 01

Milde falas la neg',
Lago silentas en preg',
Arboj en brilblanka vest'.
Goju pri kristnaska fest !

Nun varmiĝas la kor',
Cesas ĉagren' kaj dolor',
Goju pri Dia ĉeest'.
Goju pri kristnaska fest!

Sankta nokto de Di',
Vekas angelhoron ĝi,
Sonas ĉarmega atest':
Goju pri kristnaska fest'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 – †1905) en Esperanton de N. N. 01.*

MR-012-NN-1 / Arg-99-201
(2003-12-11 08:46:13)

MR-012-NN-1

Eduard Ebel,

Neḡas nun ĉie ĉi

tradukita de Manfredo Ratislavo

Neḡas nun ĉie ĉi,
lagon kovras glaci',
brilas kristnaske arbar'.
Goju vi, ho kristanar'!

Varma estas la kor',
malaperas dolor',
venas savant' de l' homar'.
Goju vi, ho kristanar'!

Malleviĝis la sun',
sankta nokt' estas nun,
kantas por ni angelar':
Goju vi, ho kristanar'!

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 – †1905) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-99-199 (2003-12-11 08:30:04)

MR-012-3

Eduard Ebel,

Ŝvebas neḡ el aer'

tradukita de Joachim Gießner

Švebas neḡ' el aer',
nun ripozas la ter'.
Mondo en brilblanka vest',
goju, ja venos kristfest'.

Varma lum' en la kor',
for ĉagreno kaj plor',
ĉesas de l' viv' la molest',
goju, ja venos kristfest'.

Baldaŭ nokto de l' glor'.
Kaj el ĉielo la hor
Sonos en dolĉa majest',
Goju, ja venos kristfest'.

*Traduko de la Germana poemo "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 – †1905) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

MR-012-JG-1 / Arg-99-200
(2012-12-24 16:27:56)

MR-012-JG-1